



# PENSEO

*N-ro 121*

*Nov./2001*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 [www.anteo.domainvalet.com](http://www.anteo.domainvalet.com)

## MASKO

**Jiang Tiejun**

Dum matenmanĝado, Lin Yu, kiu oficis kiel ĝenerala direktanto, riproĉe admonish al Lin Xiaohui, sia filino, “Kial vi ne okupiĝas pri la laboro de kuracisto, sed alkroĉigas al psikologia konsultado anstataŭe?” Li iome koleriĝis, “Kia okupo ĝi povas esti konsiderata? Tiuj, kiuj sin turnas al psikologia konsultado, estas aŭ stranguloj aŭ ŝercemuloj. Tiu okupo ne estas bonvena ĉi tie, kiel alilande!” Lin Yu emfazis la lastajn vortojn.

Ŝi kontraŭdiris, “Vi ne pravas. Ekzemple, tiuj, kiuj amvundiĝis, havas nesoveblan problemon en la menso. Se ni psikologiaj laborantoj interbabilos kun ili por doni al ili necesajn konsilojn, ili eble ne devojiĝos. Antaŭ du tagoj, al mi sin turnis junulino, kiu tre ĉagreniĝas pro tio, ke ŝi tenas kelkjaran ambiguan amrilaton kun sia superulo. Ŝi ne povas elturniĝi kaj bezonas alies konsilon kaj helpon. Ĉu vi povas aserti, ke mia laboro estas sensignifa?”

Lin Yu malaprobe hm-is, “Nuntempe tiaj junulinoj estas multaj, kaj tiaj superuloj ankaŭ nemalmultaj. Ekzemple en mia laborejo ekzistas tiaj homoj, kiujn mi severe kritikis miaparte. Ili penas teni bonan rilaton por gajni bonecon. Kiel mi povus lasi ilian artifikon realigita?”

Lin Xiaohui ridetis, “Paĉjo, se ĉiuj superuloj kondukas tiel bone kial vi, ĉu tio ne estas bona afero?”

Ankaŭ li ridetis, “Mi ĉiam min tenas demokratia. Tion, kion mi ĵus diri, vi konsideru

zorgeme.”

Ŝi kapjesis, “Mi donos respondon al vi morgaŭ.”

“Bone,” li stariĝis kaj ŝovis tekon akselen. Li iris eksteren al la atendanta aŭto.

\* \* \*

Denove venis la junulino, kiu petis konsultiĝon antaŭ kelkaj tagoj. Ŝiaj okuloj fariĝis kaj ruĝaj kaj ŝvelaj pro plorado.

Li Xiaohui demandis, “Kio estas la rezulto post via konsiderado? Vi devas fari decidon por forlasi lin. Tiu superulo nur ludas kun vi. Vi neniel konsideras tion serioze.”

“Tamen li venis al mi hieraŭ nokte kaj diris, ke li ekседziĝos kaj edzinigos min,” diris la junulino kun mallevita kapo.

Skuinte sian kapon, Lin Xiaohui diris, “Se li vere amas vin elkore, li neeble prokrastas vian geedziĝon por kelkaj jaroj. Kiel malsaĝa vi estas! Estas ne facile por li akiri hodiaŭan pozicion. Se inter la potenco kaj virino, tia viro neniam selektos la postan...”

Sidiginte la junulino, Lin Xiaohui elkore interparolis kun ŝi...

Post du horoj, Lin Xiaohui fine konvinkis ŝin.

“Antaŭe mi volis transloĝiĝi de kamparo al urbo, kaj li promesis helpi min,” diris la junulino, vringante sian baskon. “Nun mi komprenis el via analizo, ke li trompe amindumis min...”

Lin Xiaohui balances sian kapon, “Bone, se vi komprenas tio. Estas ankoraŭ ne malfrue se vi disiĝas de li.”

“Do mi ne reiros al li. Feliĉe mia lokano trovis laboron por mi.”

“Bone!” ridetis Lin Xiaohui. “Gratulon al vi

pro via brava paŝo disde li!”

La junulino starigis kaj adiaŭis. Kiam ŝi ĝisiris la pordon, ŝi ĉesis iri.

“Ŝajnas nebona, se mi ne diros al li ĝisrevidon, ĉar ne estos ŝanco por mi intervidiĝis kun li. Doktoro Lin, ĉu vi povus, anstataŭ mi, telefone transdiros al li, ke mi jam foriris?”

“Jes, jes.”

Elpoŝiginte vizitkarton, la junulino donis ĝin al ŝi. Sur la karto legiĝis: Lin Yu, Ĝenerala Direktoro de Xinda Industria Kompanio.

elĉinigi Hongjia



**EL «LAŬZI»**



ĈAPITRO 33

*(Tiu ĉi ĉapitro traktas serion da ideoj, kiuj celas moralan sinkulturadon per introspekto. Laŭzi emfazas, ke oni devas esti sufiĉe saĝa por bone koni sin mem kaj havi la volon venki siajn malfortojn.)*

Tiu, kiu bone konas aliajn, estas saĝa;

Tiu, kiu bone konas sin mem, posedas la lumon.

Tiu, kiu konkeras aliajn, estas forta;

Tiu, kiu konkeras sin mem, estas potenca.

Tiu, kiu estas kontenta, estas riĉa;

Tiu, kiu agas kun persistemo, havas volon;

Tiu, kiu ne perdas sian radikon, estas

longedaŭra;

Tiu, kiu mortas kaj tamen ne malaperas, ĝuas longan vivon.

ĈAPITRO 34

*(La Taŭo estas ĉieesta. Nur dank' al la*

*Taŭo povas ekzisti la miriadoj da estaĵoj.*

*La Taŭo estas bagatela kaj humila, ĉar ĝi servas ĉiujn estaĵojn; ĝi estas ankaŭ granda kaj admirinda, ĉar ĉio sekvas ĝin spontanee. En la lasta analizo, la Taŭo estas granda, kvankam ĝi neniam pretendas esti tia.)*

La granda Taŭo estas kiel rivero inundanta:

Ĝi povas iri dekstren, ĝi povas iri maldekstren.

Ĉiuj estaĵoj ŝuldas al ĝi sian ekziston sen

ricevi ian ajn rifuzon de ĝi.

Kiam ĝia laboro estas plenumita, ĝi ne

atribuas al si la meriton;

Ĝi nutras ĉiujn estaĵojn, sed ĝi ne pretendas

esti ilia mastro;

(Ĉiam sen sia deziro,)<sup>1</sup>

Ĝi povas esti nomata malgranda.

Ĉiuj estaĵoj revenas al ĝi, sed ĝi ne pretendas

esti ilia mastro;

Ĝi povas esti nomata granda.

Ĉar ĝi neniam pretendas esti granda,

Ĝi povas atingi sian grandecon.

<sup>1</sup> La krampoj estas aldonitaj por montri, ke tiuj ĉi vortoj eble estis poste enmetitaj de aliaj.

ĈAPITRO 35

*(Ĉiuj estaĵoj dependas de la Taŭo.*

*Malsimile al la aliaj formohavaj estaĵoj, ĝi estas nevidebla kaj neaŭdebla, tamen ĝi feliĉigas la homojn en ilia vivo kaj igas ilin ĝui pacon kaj sanon.)*

Firme tenu vin je la granda bildo (la Taŭo),

Kaj ĉiuj sub la Ĉielo al vi iros

Sen timo pri ĉia damaĝo

Kaj kun ĝuo de komforto, paco kaj sano.

Muziko kaj frandaĵoj

Povas haltigi pasantojn,

Sed la Taŭo, se eldirite,

Ŝajnas sengusta kaj enuiga.

Rigardate, ĝi estas nevidebla,

Aŭskultate, ĝi estas neaŭdebla,

Uzate, ĝi estas neelĉerpebla.

### ĈAPITRO 36

*(Ĉi tie Laŭzi esprimas sian dialektikan penson pritraktante la rilatojn inter forteco kaj malforteco, renverso kaj starigo, ktp. por indiki ilian transformiĝon unu en la alian. Li esprimas ankaŭ siajn ideojn pri politikaj taktikoj. Li reduktas tion ĉi al la koncepto "la mola kaj malforta venkas la malmolan kaj fortan" kiel principo, kiun li rekomendas uzi kiel en militoj, tiel ankaŭ en politikaj aktivecoj.)*

Se vi volas kuntiri ion,  
Vi devas unue etendi ĝin portempe;  
Se vi volas malfortigi ion,  
Vi devas unue fortigi ĝin portempe;  
Se vi volas renversi ion,  
Vi devas unue starigi ĝin portempe;  
Se vi volas preni al vi ion,  
Vi devas unue doni ĝin portempe.  
Tio estas nomata subtila sagaco,—  
Jen kial la mola kaj malforta venkas la  
malmolan kaj fortan.  
La fiŝo ne povas forlasi la profundan akvon,  
Kaj la plej akraj armiloj de la regno  
Ne povas esti montrataj al homoj.

elĉinigi Wang Congfang

**Du Fu** (712 - 770)

### AL S-RO WEI LA OKA

Kiel antipodaj du steloj, tro ofte  
unu la alian la homoj ne vidas.  
Ho, kiel bonŝance hodiaŭ vespere  
ni ambaŭ ĉe lampo komuna kunsidas !

Kiom kurte daŭris la flora juneco,  
ke haroj tempiaj al ni jam griziĝis !  
Duon' el konatoj nun iĝis fantomoj,  
ni kriis kun granda bedaŭr', surpriziĝis !

Mi tutne atendis ke post dudek jaroj,  
hodiaŭ viziti vin povas per biso.  
Vi tiam – ankoraŭ fraŭl' sen edzino,  
sed viaj gefiloj nun staras en vico.

Ĝentile demandas ili kun respekto:  
"De kie vi venas, la patra amiko?"  
Apenaŭ mi faris al ili respondon,  
vi igis regali nin per drink-prodiĝo.

Pluvnokte ektranĉis printempajn  
poreojn,  
kaj flavaj milioj – por nova kuro.  
La mastro alttaksis revidon tre kara,  
invitis dek drinkojn li kun bondeziro.

Dek drinkoj ne povos igi nin ebriaj.  
Mi tre kortuŝiĝas de l' kor-amikeco.  
Sed morgaŭ mil montoj denove disigos  
nin drivi sub peza ŝarg' de viv-neceso.

elĉinigi Guozhu



### EL «LIBRO DE POEMOJ»

#### *Kampmuso*

Kampmuso, kampmuso, ja plu ne  
ŝtelmanĝu for de mi million.  
Trijara mi servis vin, ĉu ne?  
Kompense mi gajnis nenion.  
Forlasos de vi mi sen ĝeno  
al land' ĝojbrila, trankvila.  
Ĝojbrila, trankvila tereno ———  
Jen mia loĝloko stabila.

Kampmuso, kampmuso ja plu ne  
ŝtelmanĝu for de mi avenon  
Trijare mi servis vin, ĉu ne?  
Sendankas vi mian ŝvitpenon.  
Forlasos de vi mi sen ĝeno  
al land' la ĝojbrila, trankvila.

